

# Agato

Agato estas amorfa, tavole kolorigita formo de kalcedono, demetiĝinta en geodojn, laŭ paralelaj tavoloj, prezentante variajn, ordinare diafanajn koloraĵojn. Ĝi havas la durecon de 6,5 laŭ la Mohs-skalo, kaj denson de 2,58. Ĝi troviĝas en magmaj rokaroj.

Ĝi havas la kemian formulon de  $\text{SiO}_2$ . Ĝi estas mikrokristala kvarctipo.

Ĉar ĝi estas dura, tiel ĝi estas uzata por teknikaj iloj, sed servas ankaŭ por juvelaĵoj.

La originalan nomon de agato (*aĥat*) donis Theophrastos post rivero Achates (hodiaŭ Drilo, Sicilio), kie oni trovis ĝin. Tiu skriba formo (kun ch) restis nur en kelkaj lingvoj. Ĉe la plimulto la nomo ŝanĝiĝis al agat(o).

Jam en la fruaj epokoj havis ĝi altan valoron. Ĝi estas menciita jam en la Biblio, en la 2-a libro de Moseo, 28, 17-20.

Gravaj minejoj de agato estas en Brazilo kaj Urugvajo.

Laŭ la diverskoloraj tavoloj, oni nomas diverse la agatojn.

Plej gravaj estas

*Onikso* (nigraj kaj blankaj tavoloj)

*Sardonikso* (ruĝaj kaj blankaj tavoloj)

*Muskagato* entenas nigrajn manganajn dendritojn

*Ĉielarka agato* montras diversajn kolorojn

La plej granda agato superis eĉ la 35 tunojn (1902).

Retpaĝo: [www.traduki.de](http://www.traduki.de)

Teksto: [eo.wikipedia.org/wiki/Agato](http://eo.wikipedia.org/wiki/Agato)